**La Fino de la lerneja jaro 2011-2012 en Instituto Zamenhof (IZo)**

La 6-a de julio 2012 estis la lasta tago de la lerneja jaro 2011-2012 en Togolando. Instituto Zamenhof, lernejo en la chefurbo togolanda, sianmaniere organizis la lastan tagon de la lernejo jaro.
La tutan lastan semajnon de la jaro koncernis la programo. Tiu chi konsistis el turniro de futbalo, diversaj ludoj, recitalo, pikniko, proklamado de la rezultoj de la ekzamenoj kaj kunveno de la gepatroj de la gelernantoj.
La 3-an de julio komencighis la turniro, kiu finighis la 6-an. La diversaj klasoj ludis kaj fine aperis,



ke la dua kaj tria klasoj venkis por la lasta fazo de la turniro. Venkis la dua klaso per du goloj kontrau nul.



La 6-an de julio 2012, ekde la oka horo, bolis Instituto Zamenhof pro diversaj muzikoj de ghi proponataj. Venadis la gelernantoj kaj geinstruistoj, el kiuj iuj estis en sporta vesto. Montrighis, ke aliaj ludoj okazos. Unue la instruistoj de la kolegio ludis kontrau tiuj de elementa nivelo de IZo.
Sekvis poste la finalo de la turniro de la gelernantoj de la dua kaj tria klaso. Dum okazis la ludoj, aliaj gelernantoj eniris la lernejon kun diversaj manghajhoj kaj trinkajhoj. Kelkajn momentojn poste finighis la futballudo kaj chiuj nun estis en Instituto Zamenhof.

Gelernantoj kantis, deklamis poemojn, skechis, dancadis. Estis tre agrable vidi la gelernantojn tiam.

Granda ghojo estis en chiuj, kvankam multaj el ili ne jam scias la ruzultojn de la ekzamenoj.
Tiu chi ghojo estis videbla antau en la maniero, lau kiu ili piknikis.



Gelernantoj de chiu klaso kotizis por havi komunan manghon dum la lasta tago de la jaro. La etoso estis aparta en la sesa klaso de la elementa nivelo, kie estas 100% da sukceso che la shtata ekzameno. Io tia estis ankau en la lasta klaso de kolegio, char antau tie la rezulto estis tre bona, 97,22% . Necesis scii ankau pri la aliaj rezultoj, chu ? Je la 16a horo komencighis la proklamado de la rezutloj de la ekzamenoj kun distribuo de premioj.



- Infana klaso

33 el 39 sukcesis. Tie chi rolas ne nur la diligenteco de la gelernantoj, sed ankau la agho.
Lau edukaj instrukcioj en Togolando, infano kun agho sub ses jaroj ne estas akceptata en la unua klaso elementa. Sed en iuj lernejoj oni tamen akceptas gelernantojn kun jaroj kvin.
Ankau en IZo ni faras tion. Starigante la klason infanan, ni pensis, ke preskau nur 4-jaruloj lernos tie.
Bedaurinde iuj infanoj kun iom malpli ol kvar akceptighis. Tiuj devas ripeti la klason.

- Bazlernejanoj

(Klaso: nombro de gelernantoj; nombro de sukcesintoj; procentajho) Unua kaso: 41; 39 ; 95,12%
Dua klaso : 41; 39; 95,12%
Tria Klaso : 56; 39; 69,64 %
Kvara Klaso : 42; 38; 90,47%
Kvina Klaso :49; 42; 85,71%
Sesa (lasta) klaso: 36; 36; 100%

- Kolegianoj

(Klaso: nombro de gelernantoj; nombro de sukcesintoj; procentajho) Unua klaso : 58; 52; 89,65%
Dua klaso : 51; 42; 82,35 %
Tria klaso : 50; 33; 64%
Kvara (lasta) : 36; 35; 97,22%



En la elementa nivelo la premioj estas disdonataj surjbaze de la ghenerala rezultoj, dum en la mezgrada nivelo oni konsideris ankau la rezultojn che chiu lernobjekto.



Tiel gelernantoj ricevis kajerojn kaj skribilojn. Menciindas, ke ankau gelernantoj, kiuj sekvis intensivan E-kurso fine de la jaro ricevis diversajn premiojn. Aldonindas, ke IZo donis stipendietojn al la du plej bonaj lernant(in)oj surbaze de la gheneralaj rezultoj en chiu klaso. Tiuj rezultoj dependas ne nur de la laboroj de la gelernantoj kaj geinstruistoj, sed ankau de la kontribuo de la gepatroj de la gelernantoj. Tial, ankau gepatroj kunvenis por anilizi la laborojn faritajn.
La 7an de julio, kiam la lerneja jaro jam estis fermita, homoj aperis plu en Insrituto Zamenhof. Tiam devis okazi la kunveno de la gepatroj de la gelernantoj. Antau la kunveno, la gelaborantoj de IZo kun la membroj de la estraro de la asocio de la gepatroj povis havi komunan manghon.Tuj poste komencighis la kunveno.

La ghenerala rezultoj de la diversaj estas prezentitaj al la kunvenantoj, kiuj vere kontentaj estas pri la laboroj en IZo. Ankau pri la lernokotizo en la venonta lerneja jaro estis vortoj. Estas tute evidente, ke ghi iomte pliighos pro la altigo de SMIG en la lando. Jam la asocio de la fondintoj de privataj lernejoj faris elsendon pri tio por informi la gepatrojn. Ne estis kontesto, kvankam estas tre malfacile eleteni tion. Pensante plu pri la gelernantoj, la kunvenantoj proponas tion, kion la gelernantoj devas fari dum la ferioj por eltiri profiton. Buntaj proponoj aperis : helpi gepatrojn en ties laboroj, lerni pri informadiko, partopreni feriajn kursojn, ktp. Pliaj pensoj pri la gelernantoj kondukis al prezento de asekura kompanio.
Oficisto de la asekurkompanio FEDAS jam antaue kontaktis gvidantojn de IZo, kaj li estis invitita al la kunveno de la gepatroj. Belan prezenton li faris, demandojn diversajn respondis. La gvidantoj de IZo kaj la gepatroj pripensos la aferon por vidi kio farebla estos en la venonta jaro.
Tiel finighis la lerneja jaro 2011-2012 en Instituto Zamenhof. Chiuj klasoj estas preskau plenaj jam, sed gepatroj ektelefonis al la lernejo por peti lokon por siaj gefiloj:" mi audis, ke via lernejo estas

referenco kaj tial mi shatus, ke vi tuj enskribu miajn gefilojn", diris patro. Kion povas IZo en tiu chi cirkonstanco, tio estas danki siajn subtenantojn, la geinstruistojn kaj ankau la gepatrojn, kies kontribuo donas tiun chi referencon al ghi.